

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinavaj kronoj 2,00 = germanaj markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portupalaj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj $2\frac{3}{12}$.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio. 10 % rabato por duonjaraj. 25 % rab. por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige* (Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 2 (38)

la 20:an de aŭgusto 1899

IV:a jaro.

Sciigo al la abonantoj.

Ĉar la mendo de la literoj akcentitaj por la presejo en Luleå, pro malkompreno de la literisto, ne estis ĝuste kaj korekte efektivigita, tiu dirita presejo ne povas presi nian gazeton dum la proksimaj monatoj. Tial ĝi estos daŭrige presata kiel ĝis nun en la presejo de *Upsala Nya Tidning*. Tio ŝanĝas iom niajn planojn, en kia grado ni ankoraŭ ne scias. Tamen la gazeto eliros laŭ la programo elvolvita en n:o 1; kvankam niaj abonantoj volu pardoni la eble fariĝontajn malfruigojn kaj aliajn mankojn en la komenco. Ni faros ĉion, kion ni povos, por esti kiel eble plej baldaŭ akurataj kaj regulaj.

La Redakcio.



Novajoj.

La societo "Espero" en S:t Peterburgo.

Protokolo de la Komuna Kunveno de la $10/22$ de majo 1899.

Alestis: F. de Kanaloŝŝy-Lefler, F. Postnikov, A. Burenkov, T. de Majnov, V. Rogaĉev-Antonov, A. de Polnickaja, A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko kaj E. Jeĉinac.

1. La prezidanto de la Komuna Kunveno, F. de Kanaloŝŝy-Lefler, proponis sendi al la Internacia Konferenco en Haag la sekvantan telegramon:

"La Haye, Baron Staal. — Espero, societo por disvastigado de la lingvo internacia Esperanto, korege gratulante la pacajn kongresanojn kaj dezirante fruktoportajn sukcesojn, esprimas petdeziron, ke en la Kongreso estus pri-

parolata la demando pri lingvo internacia kiel potencega movilo de civilizado, internacia kunligo kaj, sekve, de tutmonda paco. *Espero.*“

Tiu ĉi propono estis aprobita de ĉiuj alestantoj.

2. Laŭ propono de la Komitato de Espero, por ĉesigi disputajn mal-konsentojn en elektado de membroj, kiuj estis akceptitaj de la estintaj Komitatoj kaj Komunaj kunvenoj, kies protokoloj ne estis konservataj, oni decidis: kalkuli la personojn, kiuj aliĝis al la Societo en 1897—1898 jaroj, kiel membrojn de Espero.

3. La Komuna Kunveno akceptis unuvoĉe la proponojn de la Komitato:

a) elekti je efektivaj membroj la personojn, akceptitajn de la Komitato kiel kandidatoj: s-roj Gintillo, Sviridov, Rittenberg, s-rino Sviridova;

b) konfirmi la personojn, akceptitajn de la Komitato kiel membroj-korespondantoj: Seleznev (Tomsk), Pavlovski (Ŝostka), Rejner, Pugaĉev kaj Porivkin (Rjazan), Jakovlev (Aŭstralio), Ezau (Ĥortio), Konstansov (Kamiŝlov), Favorski (Nikolajevsk), Pallasman (Revel);

c) elekti je honoraj membroj de Espero la sekvantajn personojn: Graf' Lev N. Tolstoj, Paul Nylén, Charles Lemaire, Emile Lombard, D-ro da Costa e Almeida, Edouard Blanche, René Lemaire, kaj s-rino A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko.

4. La Prezidanto proponis monoferi por la “Jarlibro Esperantista” dediĉita al D-ro L. Zamenhof.

5. Estis tralegita kalkula raporto de la spezoj societaj de la jaro 1898, en kiu raporto estas motrita la restita sumo de 1897 jaro = 14 rub. 68 kop., enspezoj de 1898 jaro: 421 rub. 44 kop., elspezoj de tiu ĉi sama jaro: 423 rub. 77 kop. kaj restita sumo je la 1:a januaro de 1899 jaro = 12 rub. 35 kop.

Tiu ĉi raporto estis konfirmita de la Komuna Kunveno.

6. Laŭ propono de la Komitato oni decidis esprimi koran dankon de la Societo al s-ro F. A. Postnikov por lia fruktoporta laboro en la ofico prezidanta de Espero kaj danki s-ron V. Rogaĉev-Antonov por lia senpaga laboro pro la afero.

7. Estis tralegita la regularo por filioj aliurbaj de la Societo Espero, proponata de la Komitato.

La Komuna Kunveno decidis:

a) proponi al la novaj filioj elektadi el sia nombro korespondanton por komunikigo kun la Societo Espero, redakcioj gazetaj ktp.;

b) plenrajtigi la Komitaton, se oni bezonos, por liberigi provincajn membrojn de ĝiaj filioj por ke ili ne enportu membran pagon.

Anstataŭ la artikolo de Havelock Ellis “Internacia lingvo en la estonteco”, kiun tralegi intencis s-ro K. Ostanieviĉ, forveturinta el Peterburgo la 8/20:an de majo kaŭze de familia doloro (morto de lia patrino), s-ro V. Rogaĉev-Antonov tralegis artikolon de s-ro K. Ostanieviĉ “Pri la nuntempa stato de l' demando pri lingvo internacia.”

Post tio ĉi la Kunveno estis finita.

V. Rogaĉev-Antonov.

Membro de la Komitato de Espero.

* * *
Novaj aferoj — novaj nomoj. En la aŭstra-hungara monarĥio — pro la ordigo valuta — ekzistas novaj specoj da moneroj; anstataŭ guldeno kaj krejĉero ekzistas *Krone* kaj *Heller* (germane, — hungare: *korona*, *fillér*).

Por esprimo de tiuj ĉi monaj nomoj d-ro Zamenhof konsilis uzi la esperantajn vortojn: *krono*, *helero*. — Krono estas duon-guldeno, helero estas duon-krej-cero; do unu krono konsistas el 100 heleroj.

Oni volu atenti la diferencon inter skandinava krono — la mona unuo sveda, norvega kaj dana — kaj la aŭstra-hungara krono. *Skkr.* = 1,39 franko; 1 fr. = 0,72 skkr.; *ahkr.* = 1,04 franko; 1 fr. = 0,95 ahkr.

* * *

La "Libro de l' Humoro" estas nun en presado. Ĝi ricevos en la literatura nomaro la numeron 124.

* * *

S-ro Kazi-Girej petis nin sciigi siajn korespondantojn, ke li transloĝiĝis en Ĥinuĵon, kie li restos dum ĉirkaŭe tri jaroj, partoprenante en konstruado de fervojoj. Li loĝos en urbo Telin, staranta sur la bordoj de rivero Liao-Ĥe. Pri sia preciza adreso li sciigos pli malfrue. Ni esperas, ke tiu ĉi agema esperantisto ne preterlasos rakonti al siaj samideanoj, per artikoletoj en nia gazeto, pri tiu interesa kaj stranga lando.

* * *

La adresaro de l' esperantistoj, jaro 1898, eliris el la presejo. Ĉiuj legantoj sendube jam scias, ke D-ro Zamenhof presas ĉiujare nomaron de la novaj esperantistoj, kiuj sendis al li sian nomon kaj adreson. Ĉirkaŭe 325 personoj estas enskribitaj en tiu ĉi nova kajero, el kiuj pli ol triono apartenas al Francujo kaj Belgujo. Tiu ĉi proporcio atestas kaj certigas la progresojn tre seriozajn kaj efektivajn kiujn faris nia afero dum la lasta tempo en la landoj francelingvaj.

Tiuj, kiuj dezirus la Adresaron 1898, povas mendi ĝin ĉe la Sekretario de la Societo por la propagando de Esperanto, s-ro René Lemaire en Epernay (Marne), Francujo; ĝi kostas 0,45 fr. afrankite.

* * *

S-ro Miĥail Smolin, la plej malnova esperantisto de Astrahan, mortis en la komenco de la somero havante la aĝon de 39 jaroj. Li estis laborema propagandanto de Esperanto en sia urbo kaj provinco.

* * *

Notoj familiaj.

En la katedralo de Åbo en Finnlando estis edzigitaj la 3-an de aŭgusto la sveda ĵurnalista, filozofia kandidato *Valdemar Langlet* kaj fraŭlino *Signe Blomberg*, ambaŭ varmaj amikoj de Esperanto. S-ro Langlet estas konata inter la esperantistoj kiel sukcesa verkisto kaj kiel unu el la fondintoj de tiu ĉi gazeto en la fino de la jaro 1895; dum multaj jaroj li estas prezidanto de la Klubo Esperantista en Upsala.

—>:§:<—

Pripensado. — Nu, mia filino, ĉu la sinjoro prezidanto ne faris ankoraŭ sian konfeson?

— Ho jes, patreto; sed mi petis de li la templimon da du tagoj por pripensadi.

— Ho malsaĝulino! dum du tagoj ja li ankaŭ povos pripensadi!

(El la "Libro de l' Humoro" nun presata.)

Antikva Roma gazeto.

Verkis **Viktor Rydberg.**

El "Eko", festscribo por la jubileo 25-jara de la Sveda Publikigista Klubo.

La romanoj havis gazetojn aŭ, pli korekte, ili havis unu gazeton, ĉiutagan kaj oficialan, iel similan al la sveda "Post- och Inrikes Tidningar" (poŝta kaj regna gazeto), fonditan de neniu malpli signifa persono ol *Julius Caesar*. Ni rigardu unu roman gazetan redaktoron en sia agado!

La horo estas, laŭ nia maniero de kalkulo, ĉirkaŭ la 8-a en la mateno. La redaktoro de la oficiala gazeto (*Acta diurna* estas ĝia nomo) aliras al sia oficejo, tio estas: ia malferma kolonejo apud la urba placo. La suno brilas carme sur la korintiaj kolonaroj, kiuj ĉirkaŭas la amasemoviĝantan de urbanoj kaj fremduloj el ĉiuj partoj de la mondo riĉan je memorindaĵoj *Forum Romanum*.

La dek skribistoj de l' redaktoro estas en la plej streĉa agado: ili estas ĉirkaŭataj de homoj, kiuj volas en la gazeto anonci pri naskoj, ekmortoj, edziĝoj kaj multe da alio. La kasisto de la gazeto estas plene okupita akceptante, kalkulante kaj enmetante en kasan keston la *sestertius*'ojn de l' anoncantoj.

La ĉefa redaktoro restas forigate de tiuj ĉi grupoj: li havas aliajn aferojn por prizorgi. Referentoj venas kiel adjutantoj alkurante el la basilikoj kun raportoj pri la rimarkindaj procesoj, kiuj tie estas kondukataj; aliaj referentoj ĉevenas kun priskriboj pri la lasta granda festo de la kortego, pri la paradeca funebra procesio de l' senatoro hieraŭ enterigita (*Fashionable news!*), pri verkoj, kiuj ĵus eliris (*Literaturo!*), pri sanktaj oferoj, kiuj estos farataj en la proksimaj tagoj (*Ekleziaj sciigoj!*) k. c., k. c. La ĉefa redaktoro liveras tiujn skribaĵojn al kunhelpanto kaj turnas sian atenton al iaj fremduloj, kiuj rakontas al li pri naturfenomenoj kaj mirindaĵoj, viditaj en iliaj hejmaj regionoj k. t. p. (*Diversaĵoj!*). Li notas tion per ekzercita mano sur vakstabulo, kiun li transdonas al unu el siaj skribistoj, kaj salutas en la sama momento unu altan oficiston, kiu preskaŭ senspira ĝiskuras al li.

— "Mia bona *Aulus Septimius*" (ni supozas, ke la redaktoro estas tiel nomata), ekdiras la nove veninta, "notu, notu!"

"Kion, mia *aedilis*?"

"Vi demandas kion? Ho, *Herkules!*, ĉu vi ne komprenas, ke mi aludas lin, la leonon de hodiaŭ, la altan gaston, kiu alvenis hodiaŭ sana kaj freŝa, spite la longa, blovega vojaĝo de trans la maro! Vi devas vidi lin per propraj okuloj por povi inde lin laŭdi. *Candidus*, mia propra laŭrigita gladiatoro batalos kontraŭ li. Mi donacas kaj *Candidus*'on kaj lin al la popolo romana, la kara, kara popolo romana! Estas la leono de la leonoj, la reĝo de la reĝoj, nova *Tigranes*. Kiaj okuloj, kia reĝa teniĝo! Vi vidos mem, mia *Aulus*, kaj vi admiros! Li estos la plej bela alporto al la morgaŭaj ludoj en la amfiteatro. Rilate je li la dekunu krokodiloj estas nenio, kaj la dekunu marĉevaloj, kiuj batalos kontraŭ la krokodiloj, malpli ol nenio — *minus nihilo!* *Aulus*, vi estas mia amiko, sed se vi ne volas, ne bezonas vi nepre elnomi, ke estas mi, kiu donacas al la popolo romana la neŝateblan leonon kaj la bonegan *Candidus*. *Vale! Vale!*"

La edilo rapidas for. *Aulus Septimius* enmetas la leonon kaj *Candidus*'on en la jam pretan programon de la proksimaj ludoj amfiteatraj (*Publikaj Amuzadoj!*) kaj ne forgesas observigi pri la malavara doninto (*Pufo!*). La

leono de l' edilo ne estas unu el tiuj, kiuj amante dolĉparolas pri sia amo, kaj kolerante certigas je *parole d'honneur*, ke ili estas terure indignitaj; ĝi estas leono, kiu eltondras sian amon tiel same ol sian koleron. Ve al *Candidus*, kiu devas batali kontraŭ ĝi!

Laŭ nia tempkalkulo estas nun ĉirkaŭ la 9-a horo. La ĉefredaktoro atendas senpacience la aktuarion, kiu raportos al li la hieraŭan decidon de la senato. Fine tiu alvenas. La redaktoro akceptas la gravegajn skribaĵojn. Unu el la decidoj koncernas la *pantalonojn*. La imperiestro sciigis kun mal-kontenteco, ke tiuj ĉi maldecaj vestaĵoj, kiuj ofendas la okulon, difektas la sanon kaj kaŝas la malzorgon je banoj kaj ekzercadoj de l' korpo, komencis tie ĉi kaj tie aperadi en la urboj de l' norda Italujo. La imperiestro tial ordonas, ke ĉiuj, kiuj uzas tiajn neromanajn, karakterajn al barbaroj vestaĵojn, estu en la nomo de l' moralo elpelitaj el la urboj.

Tio estis *unu* el la decidoj, sed la aliaj? Ho, ve! Sangaj juĝoj kaj malhonestajoj de ĉiaj specoj rekomenditaj de l' imperiestro, aprobitaj de la sklaveca senato.

Aulus Septimius trarigardas la nomaron de la senatoroj, kiuj alestis en la pridisputado. Eĉ nenia voĉo en tiu kolektaĵo da eminentaj sklavo- kuraĝis laŭti kontraŭ la despoto. La sola senatoro, kiu ne volas esti sklavo, per sia foresto protestis kontraŭ la malnobliĝo de la senato. Tiu heroa viro estas *Thracea Pætus*.


Aulus Septimius, kvankam redaktoro de la oficiala gazeto de Romo, konservas profunde, tre profunde, en sia brusto fajron da amo je la antaŭa libero. Lia frunto sin formas je sulkoj, li meditadas, ŝanceliĝas, prenas sian decidon kaj almetas sub la nomaron: *Thracea ne alestis en la kunsido (Thraceam non introisse curiam!)*. Li ŝanceliĝis, ĉar tiuj ĉi vortoj povus kosti lian kapon. Ĉiu romano komprenos ilian sencon. Sin trovas en tiuj ĉi vortoj koncentrita la tuta indigno je la tiranaĵo, kiu subbruladas en milo da brustoj, kiuj havas kuraĝon por indigni, sed ne por agi.

Je duonhoro poste, la gazeto de l' tago estanta estas pretskribita. Dek reskriboj de ĝi estas dividitaj inter dek diversaj reskribejoj. Je kelke da horoj poste, ĝi cirkuleras en miloj da kopioj ĉirkaŭ la mondurbo, kaj ankoraŭ en la sama vespero disiras per la poŝtoj multaj miloj da kopioj al la provincoj, tiel ke la romana mondo baldaŭ sciigĝos, kion *Thracea ne* faris.

Kaj *Thracea Pætus* mem! Ĉu ni rakontu, kiel li mortis fine je la morto de martiro pro la libero, kiel lia nobla edzino, kiu volis morti kun li, pikis la ponardon en sian bruston kaj, kiam *li*, la viro, maldecidiĝis apud la pordo de la morto, ridetante transdonis al li ĝian ŝlosilon, la ŝtalon sango- gutantan, kaj kuraĝigante diris al li malfortvoĉe: *ne doloras, mia Pætus (non dolet, Pæte!)*? — — —

Tradukis el sveda lingvo

Paul Nylén.




Malkonsento. Sinjorino Y. skribas leteron al sia amikino. Dum la skribado ŝi rimarkas, ke Evelin legas la leteron post ŝia dorso. Ŝi daŭrigas skribante:

“Mi volus el vi skribi ankaŭ sekreton, sed mi nun ne povas, ĉar Evelin staras malantaŭ mi kaj legas mian leteron.”

Evelin kolere diras: — Tio ĉi ne estas vera; — mi ne legas vian skribaĵon.

(El la “Libro de l' Humoro” nun presata.)



Skizoj de Baku.

II. La maraj fajroj apud Baku.

Kelkaj dekoj da metroj de l' bordo de Bibi-Ejbat, en la mezo de l' maro, estas kuŝanta unu loko, kiu estas konata per sia fenomeno, nomata "la maraj fajroj". Tie ĉi la maro — sur la spaco de kelkaj kvadrataj metroj — konstante bolas kaj ŝaŭmas, simile je ia grandega taso kun akvo de Selcer, — eligante naftajn gasojn, kiuj sin levas de l' fundo, kaj — ekbruligitaj en trankvila vetero — bruladas ĝis tiam, kiam la fajro estas forblovita per forta vento.

Dum la somero, ĉiu dimanĉo, unu vaporŝipeto veturigas tien ĉi la publikon, ekirante, kompreneble, en krepusko, por ke oni admiru la efekton de l' brulanta maro en la rekta tempo — nokte. La vaporŝipeto post multaj akraj fajroj, devantaj kunvoki eble plej multe da *turistoj*, fine sin forpuŝas de unu el centralaj urbaj havenoj; tra densiĝanta krepusko la skizoj de l' ŝipoj, kuŝantaj sur ankroj, estas vidataj neklare; en la urbo iom post iom estas ekbruligataj fajroj, kaj ju pli foriras la vaporŝipeto de l' bordo, muĝante kaj facile sin balacadante, — des pli bela fariĝas la pentraĵo de l' urbo, kiu renkontas la mallevantan nokton ile miloj da brulegataj fajroj.

Baku kuŝas amfiteatre sur la flankoj de l' montoj, kiuj sin deklinas je nordan bordon de ronda golfo de l' maro Kaspia, enstaranta je Apŝerona duoninsulo. Kiel mi jam rimarkis en la skizo "Brulanta nafta fontano apud Baku" (L. I. 1898. V) tiuj ĉi montoj estas tute nudaj, senvivaj, sen ia kreskaĵo. La mezo de l' urbo estas ĝia malnova parto, nomata "la fortikaĵo"; tio ĉi estas unu reto de orientaj, mallarĝaj, kurvaj, plektiĝantaj stratetoj, kiuj estas ĉirkaŭitaj per unu komuna muro kun turoj, la eksteraj fortikaj kavoj de kiu jam estas defositaj. Super la aro de l' novaj kaj malnovaj domoj en orienta stilo, kiuj amase sin puŝas en tiu ĉi spaco, sin levas ĉielon minaretoj kaj kupoloj de kvar mahometanaj preĝejoj, muroj de estinta ĥana palaco, kiu servas nun kiel tenejo por militobjektoj, kaj — sur la bordo de l' maro mem — unu alta turo, nomata Fraŭlina, je kiu estas kunligitaj multo da legendoj kaj kiu servas nun kiel lumturo, montranta la eniron je golfo de Baku.

Baku estas tre malnova urbo, kiu, kredeble, estis fondita ankoraŭ antaŭ la Nasko de Kristo, kaj kiu estis la loko de ŝanĝkomerco inter Orienta Eŭropo kaj la Kaŭkazo — unuaflanke kaj Persujo — aliaflanke; krom tio ĉi, dank' al la elirlokoj de naftaj gasoj, kiuj estas kuŝantaj en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kaj ebligis la eston de l' eternaj fajroj, ĝi estis ĉiam sankta loko por la fajradorantoj. La ĥana palaco, nun jam duondetruita, sed konservanta ankoraŭ signojn de estinta estetikeco (ekzemple: la arkoj de l' pordegoj, riĉe ornamitaj per ŝtona hakitaĵo), — estis konstruita en la XIV centjaro. Dum la lasta tempo de sia maldependeco, Baku kaj siaj ĉirkaŭaĵoj faris landon de l' ĥano (azia princo), kiu, kiel la najbaraj ĥanoj de l' transkaŭkazaj landoj (Kuba, Ŝirvan, Ŝeki, Nuĥa, Karabaĥ, Hanĵa, Taliŝin, Saljan kaj aliaj) estis vasalo de Persujo kaj estis al militita de l' rusoj en la jaro 1806. Ĉirkaŭ la monteto de l' fortikaĵo sur flankoj de l' montoj estas kuŝanta la nova urbparto, kiu estas multoble granda ol la malnova kaj planita pli-malpli regule; rekte de ĝi, laŭlonge la bordo de l' maro, estas kuŝanta la antaŭurbo, kie sin batas la koro de l' industrio de Baku — la "Nigra Urbo", kie estas koncentritaj ĉiuj naftaj fabrikoj. La plej granda parto da domoj en Baku havas du ecojn: ili estas,

unue, konstruitaj el tieaj grizetaj ŝtonoj, je kiuj oni tre facile elhakas eĉ la plej kunmetitajn arĥitektajn ornamantojn; tial ili estas nek stukitaj, nek koloritaj; due, anstataŭ tegmento super ili troviĝas plata placeto, kovrita per "kiro", t. e. tero, sorbiginta per nafto, kiu estas akirata en ĉirkaŭaĵoj de Baku kaj similas je asfalto; la dua eco estas sekvigita per la malkareco de kiro kaj parte — per la blovantaj tie ĉi oftaj kaj fortaj nordaj ventoj, kiuj iafoje povas eĉ forblovi la tegmenton; tiuj ĉi ventoj sekvigas la nomon de l' urbo: Bad-kubé perse signifas: kupolo de ventoj.

Tiuj ĉi nudaj, ruĝetgrizaj montoj, ĉirkaŭantaj la urbon, tiuj ĉi grizaj domoj, kiuj estas kovritaj anstataŭ tegmentoj — per grizaj kiraj terasoj, — ĉio tio ĉi faras sufiĉe malgajan impreson, kiam oni rigardas je l' tago la vastan amfiteatron, kiu ĉirkaŭas la golfon.

Sed nun, kiam ni elektis por la promeno trankvilan vesperon, — kiuj estas tiel maloftaj en klimato de Baku, — kiam la nokto jam kovris la teron per sia kurteno, kaj la steloj briletas sur la senluna suda ĉielo, — la urbo, kiam oni ĝin rigardas de l' vaporŝipeto havas tute alian vidigon. Jen, — unu longa vico de kerosenaj lanternoj sur la mara bordo mem signifas la surbordon, ie sin rompante per elektraj lanternoj de l' vaporŝipaj havenoj; jen, — pli maldekstre, — unu grupo de kelkaj elektraj lanternoj devas signifi la mizeran kaj maldensan urban ĝardenon, kie nun sin puŝigas amase ĉiuj, kiuj devis resti en Baku (kaŭze la forta varmego en daŭro de somero la familioj de pli-malpli bonhavaj loĝantoj forlasas la urbon por tiu ĉi tempo); jen — unu amaso de elektraj lanternoj dekstre signifas la fabrikojn de Nigra Urbo; kaj super tiuj ĉi grupoj la urbo signifigas per amasoj, linioj, apartaj punktoj de lanternoj, kiuj jen iras reciproke paralele, jen — reciproke sin interrompas diversangule.

Ju pli malproksime foriras la vaporŝipeto de l' haveno, des pli majesta amfiteatro de lanternoj kaj fajroj ĉirkaŭkaptas la golfon. El la urba ĝardeno aŭdiĝas en trankvila nokta aero sonoj de muziko. La publiko mallauĝigas, — tiu ĉi diverskolora publiko de Baku: jen enlandanoj — mahometanoj kaj armenoj, — jen persoj-komercistoj, jen oficistoj kaj kontoristoj, kiuj ĝuas je dimanĉo kaj la bela vetero; jen gimnazianoj, kelkaj sinjorinoj. Jen — la vaporŝipeto alproksimiĝas al la mezo de l' golfo, de kie oni preskaŭ egale klare vidas la konstantan blankan fajron de la lumturo de l' insulo Nargen, la plej granda de l' tri insuletoj, kiuj fermas la eniron en la golfon, — kaj la intermitan, blankan kaj ruĝan, fajron de l' borda "Fraŭlina" lumturo.

Jen — ĝi alproksimiĝas al la promontoro Bailov, kiu limigas la golfon de okcidento, — ĉirkaŭpasis ĝin, — kaj subite montriĝas unu grupo de fajroj de l' akirlokoj de Bibi-Ejbat. En la nigra akvo de l' maro, kiel tremantaj kolonetoj, sin rebatas la bordaj fajretoj; de l' bordo aŭdiĝas senĉese la spirego de vapormaŝinoj kaj — iafoje — voĉoj de homoj kaj bojo de hundoj; jen — la vaporŝipeto alproksimiĝas al la loko, kie la nigra supraĵo de l' maro estas kovrita per multegaj blankaj veziketoj de l' leviĝanta de l' fundo gaso; ni estas — eĉ la celo. El la kaldronĉambro ekaperas ŝipano kun kelkaj fasketoj de stupo sorbigita per nafto en siaj manoj. La tuta publiko amasiĝas apud unu rando de l' ŝipeto, kaj ĝi fleksiĝas per sia ferdeko apenaŭ ĝis la akvo; la ŝipano ekbruligas la fasketojn — unu post la alia — kaj ĵetas ilin sur la bolantan supraĵon de l' maro; post kelkaj neprosperaj spertoj ĉirkaŭ unu fasketo de stupo, kiel elkurbigantaj serpentetoj, ekflamas la supraĵo de l' maro; la vaporŝipestro ordonas: "plene malantaŭen"; la ŝipeto rapide eliras

el la regiono de l' eligantaj gasoj kaj ree haltiĝas; la flamo ekbruliĝadas plu kaj plu, ĉirkaŭkaptas la tutan supraĵon de l' eliro de gasoj; jen — ĝi kiel serpentetoj trakuras de unu punkto al la alia, jen — ĝi buliĝas super la akvo. La fizikaj kaŭzoj de tiu ĉi vidaĵo antaŭ niaj okuloj — la brulanta supraĵo de maro — estas klaraj al ni; estas tute komprenebla, ke brulemaj gasoj, senĉese sin eligantaj de l' mara fundo, brulas sur ĝia supraĵo dum la trankvila vetero; sed al nia konscio, kiu kutimis konstante kontraŭigi la akvon kaj la fajron, estas stranga vidi ilin en tia kunigo.

La vaporŝipeto malrapide foriras de la "maraj fajroj" kaj, farinte rondon, direktiĝas reen preter la promontoro Bailov al la urbo, kaj konforme la turnado de l' vaporŝipeto, sin turnadas la kapoj de l' rigardantoj: ili estas ĉiuj direktitaj al tiu loko, kiun la ŝipeto forlasas, al tiu negranda spaco, kie sur la supraĵo de nigra akvo, en la mallumo de trankvila senluna suda nokto, transkuras kaj buliĝas fajretoj de brulantaj naftaj gasoj; la okuloj streĉe rigardas tiun ĉi maloftan vidaĵon, — eble, la solan sur la tero, — ĝis tiam, kiam la promontoro Bailov, preter kiu ni fluos, — kaŝos la vidon de Bibi-Ejbat.

La vaporŝipeto eniras la golfon de Baku, kaj je ĉia turno de ŝipsraŭbo pli kaj pli laŭte aŭdiĝas la muziko en la ĝardeno, la bruego de kaleŝoj super la ŝtona pavimo, la bruo kaj la sonego, la tuta tondro de vivo de Baku, de tiu ĉi urbo, sorbigita per nafto, naŭ dekonoj de kies loĝantaro estas homoj enmigrintaj, kiuj kunkuris tien ĉi, persekutante: la unuaj — sian panon ĉiutagan, la aliaj — la riĉecon...

M. M. Abesgus.

ANONCOJ.

Edziĝis

Valdemar Langlet

kaj

Signe Blomberg

en Åbo, Finlando.

Anoneaj agentoj!

Ni deziras anoncajn agentojn.

Sin turnu al

Ekspedejo de Lingvo Internacia

Luleå (Svedujo).

Libera loko por anonco. Libera loko por anonco.